

ESPERANTO

TRIUMFONTA

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, advok., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 182
9. 3. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0.06 dolaro
aŭ 0.20 sv. fk. por landoj, kies valuto
sufiĉe maksimume 50%; por ĉiuj aliaj,
landoj 0.05 dol. aŭ 0.25 sv. fk.

Anonprezo

po kvadrat-centimetro egalvaloro de
0.20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0.15 sv. fk.,
en „Internacia Komerco“ la duoble.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La ŝancoj de Esperanto en Rumanujo.

Intervjuo kun s-o Generalo Gavanescu, honora prez. de Rumana Esp. Societo.

Kiel oni scias, antaŭ la mondmilito floranta Esperanto-movado estis en Rumanujo sub la lerta gvidado de nia — bedaŭrinde jam mortinta — senlaca samideano D-o Robin kaj liaj kunlaborantoj. La landan societon honoris per sia alta protektado Elizabeto, tiama rumana reĝino, kaj la honora prezidanto de R. E. S. estis s-o Generalo D-o Demosthen, seneca inspektoro de la rumana armeo. La konscia laboro de tiuj malnovaj pioniroj — apogita de tiom gravaj personoj — rezultigis fruktodonajn rikoltojn sur ĉiam pli vastiga kampado, — kiam la milito ĉesigis ankaŭ la agadon de la esperantistoj.

Post la milito sekvis la malfacila laboro: revivigi la ruinojn-restaĵojn, konstrui novajn murojn. Tio okazis en la II-a kaj III-a kongresoj en Ĉiuj kaj Timiŝoara, pri kiuj la legantoj de ET sciigis el la aperintaj gazetraportoj. En tiuj kongresoj estas ellaboritaj novaj statutoj kaj la rumana esperantistaro elektis por la gvidado ses-membran komitaton. La komitato komencis sian agadon per la organizo de la ĉefurba kaj provincaj grupoj.

Pri la reorganizata Societo varme interesiĝis kaj apogis ĝin s-o Generalo Gavanescu, kiu eĉ prezidis publikan propagandan kunvenon kaj la III-an Rumanan Esp. Kongreson en Timiŝoara, reprezentante Nian Kronprincaŝon Moŝton Carol, la altan protektinton de la kongreson.

S-o Generalo Gavanescu estas eminenta persono de la rumana inteligentularo, havante gravan rolon ankaŭ en la spirita gvidado de la lando, kiel verkisto. Pluraj liaj verkoj estas premiiitaj de la Akademio Rumana. Nobla homo, kun larĝa horizonto, kies vastaniman pensmanieron karakterizas la sekvantaj linioj, cititaj el antaŭparolo de epopeo de la s-o Generalo:

„Kiam la paco efektiviĝos sur la tuta tero, nur tiam ĝi etendiĝos ankaŭ en niaj animoj. Kaj tiam, vere feliĉa, mi povos verki en la sekvanta eldono ankaŭ la lastan parton de nia epopeo: Pri la Granda Unuiĝo.“

Kiel signon de sia profunda dankemo, pro la honoro kaj altvaloraĵoj helpoj donitaj al R. E. S., la gvidanta komitato en sia unua oficiala kunsido elektis kiel honoran prezidanton s-o Generalon Gavanescu, kiu kun plezuro akceptis ĝin. Okaze de tio, ni petis sinjoron Generalon por doni al ni mallongan intervjuon, kiu certe intereso de la legantoj de ET:

— Estimata sinjoro Generalo, kiam vi aŭdis la unuan fojon pri Esperanto?

— Antaŭ 25—30 jaroj.

— Kio estas via opinio pri la vivebleco de la mondkaj kiel vi ĝenerale konsideras la esperantan movadon?

— Se antaŭ certa tempo ekzistis nur dek esperantistoj, kaj hodiaŭ centmiloj da adeptoj arigas ĉirkaŭ la verdstela standardo, tiu fakto elokvente parolas. En iu ajn nova afero la plej certa pruvo pri la vivkapablo estas la progreso.


— Mi konsideras Esperanton kiel la lingvon de la estonteco inter ĉiuj popoloj. Kaj mi opinias, ke vi ne celas la forigon de l' gepatra lingvo, sed vi intencas ĝeneraligi la uzon de nova interkomprenilo, uzebila de ĉiuj nacioj.

— Kian perspektivon havas Esperanto en Rumanujo?

— Pro la mirinda simileco de l' rumana kaj esperanta lingvoj — Esperanto havas tre grandajn ŝancojn speciale en nia lando. Nijaj klopodoj devas celi la baldaŭan oficialan enkondukon en ĉiujn lernejojn. Se ekzemple vi disponigos al mi taŭgan profesoron, mi volonte enkondukos Esperanton ankaŭ en nian Artillerian Oficiran Lernejon.

— S-o Generalo! Ni aŭdis tre diversajn opiniojn pri la rolo de la oficioj en la esperantista movado. Kio estas via vidpunkto?

— La ĝena: Dum la milito la oficioj havas la devon pri la defendo de la patrujo. En la paco la oficioj devas simple daŭrigi la dumilitan



S-o Generalo Gavanescu, honora prez. de Rum. Esp. Soc. (RES), kun la du vicprezidantoj de RES: s-o kuracisto-kapitano D-o Josif kaj s-o Henriko Fischer, L. K.

laboron — zorgi pri la kultura vivo de l' patrujo, nesto de la kulturo. Ĝuste la oficioj, kiel klarvida intelektularo, povas efike labori pri la disvastigo de l' kulturo, kies gravan parton reprezentas Esperanto.

— Antaŭ ol esprimi al vi nian dankon pro viaj ŝatafaj simpatioj kaj apogo al nia movado, ni ĝoje povas komuniki al vi, ke dum la mondkongreso de Nürnberg, kiam la rumana delegataro raportis pri via altvalora kunhelpo, la kongresanoj kun aplaŭdo sciigis pri tio, kaj nun la simpatio de l' samideanaro, apud alia ŝatata militisto franca kaj samcelano Generalo Sebert, ĉirkaŭas ankaŭ vin, estimata sinjoro Generalo.

— Mi tre ĝojas kaj estas fiera pri tio, kaj mi klopodos meriti tion per sincera helpo al la grandioza ideo de l' mondlingvo.

Klara albrilo de energia okulpuro, forta vireca manpremo, mallongaj salutoj . . . kaj eĉ foririnte mi havas antaŭ mi la bonvolan vizaĝon de nova, sed meritplena amiko de Esperanto.

Tiberio Moraria.

Socia Vivo.

Socialaj studoj.

Fektiva kaŭzo de militoj.

Ni publikigas nun kiel finparolon en tiu ĉi interesa diskutado la respondon de la unua aŭtoro de la artikola serio.

Finparolo.

I.

El tri diversaj landoj, Germanujo, Anglujo kaj Svislando, venis rezono je mia artikolo lokita en n-oj 165—167 de „ET“ sub la sama titolo; de samideanoj: Otto Bonte el Frankfurt a. M., J. W. Leslie el London kaj Alfredo Egg el Rieden b. Baden.

Antaŭ ĉio mi opinias necese esprimi: 1. mian sinceran dankon al ĉiuj tri miaj kontraŭuloj-opoziciantoj pro ilia atento je mia artikolo, 2. mian fortan ĝojon pro kredebla supozo, ke tiu mia unua artikolo en „ET“ ne pasis senatente preter okuloj de la legantoj de „ET“.

Nun mi permesas al mi respondi al ili je iliaj plej gravaj kontraŭdiroj kaj malkonsentoj rilate al mia artikolo. Komence mi devas noti, ke ĉiuj tri miaj opoziciantoj faras unu ĝeneralan teorian eraron; nome pro sia malatento kaj malkompreno de principo de psika relativeco, kiu estas fundamenta principo je kiu mi bazis pruvojn de mia artikolo.*

Ekzemple s-o Otto Bonte insiste penas pruvi, ke iufoje estas pravaj marksanoj, iufoje anarhistoj kaj iun alian fojon pacifistoj, kaj tute tamen malatentas je tio, ke nome tion mi ankaŭ asertis kaj notis en n-o 167 de ET en V. parto de mia artikolo sufiĉe klare en la jenaj vortoj: „reala vero povas esti nur relativeca, t. e. ke ĉiu el iliaj (t. e. de marksanoj, anarhistoj kaj pacifistoj) asertoj povas okazi relative vera dum apartaj kondiĉoj de spaco kaj tempo“.

S-o J. W. Leslie diras: „La anoj de Kibbo Kift rifuzos deĵori en iu ajn milito, ĉu enlanda, ĉu eksterlanda.“ Mi je tio diras: ke ĝi estas nome malbona celo, ĉar tia ago estas kontraŭdiro al principo de relativeco. Efektive, oni devas nepre konfesi, ke ne ĉiam estas malhonte partopreni en milito, same kiel ne ĉiam estas malhonte defendi sin aŭ siajn parencojn, aŭ proksimulojn kontraŭ atakoj de iuj rabistoj, perfortuloj kaj aliaj malbonintenculoj: tiam eĉ eble ĝuste kontraŭe povas okazi, ĉar malkontraŭstaro al malbono estas ankaŭ malbono kaj krimo ne malpli granda ol iu unua malbono mem.

Kaj fine s-o Alfred Egg parolas multe pri „perfekta“ homo. Sed tiu ĉi koncepto ankaŭ estas nur relative vera. Nome por religio tiu estas perfekta, kiu kredas plej kore je Dio, kaj por ateisma materialisto perfekta estas tiu, kiu ĝuste kontraŭe plenkore tian kredon forĵetas kaj neas.

Nun iom pli detale aparte al ĉiu el la opoziciuloj.

Komence al s-o Otto Bonte, kiu pretendas, ŝajnas, preni por diskutado tiun armilon, kiun mi persone konfesas sole taŭga kaj ĝusta, t. e. metodon racian.

La opozicianto kun tre certigita tono de plena konvinko asertas, ke „la reprezentantoj de la tri traktitaj doktrinoj diras, ke la verkinto ne trafis la veran esencon de iliaj teorioj“, kaj plue, pensante pravi tion, li diras: „marksanoj respondos, ke ili vidas kaŭzon de milito ne en personoj, la kapitalistoj, sed en sistemo, la kapitalismo“. Sed kion do deziras la estimata mia opozicianto per tio pravi aŭ refuti en la konkreta afero? Ĉu eble tion, ke kapitalistoj estas ne ĉiam, kiam estas kapitalisma sistemo? Aŭ eble tion, ke en mia ekzemplo, t. e. en Kaluga gubernio, neniam estis kapitalisma sistemo? Tiam mi respondos al li, ke li estas tute plene malpravaj, ĉar estas tio ak-siome vera, ke kapitalistoj ekzistas tiam kaj sole tiam, kiam ekzistas kapitalisma sistemo; krom tio mi diras, ke sendube estas vera tio, ke neniu vera kaj prudenta marksano asertos, ke en Kaluga gubernio neniam estis kapitalisma sistemo.

Plue la opoziciulo parolas: „La vera marksano eĉ ne diras: nenigu la kapitalisman sistemon; sed li diras: ekzameni la tempo, ĉu la cirkonstancoj estas oportunaj al ŝanĝo de l' profit-

* Same interalie de tuta kreita de mi mondkoncepto, aŭ doktrino, kiun mi nomis „saismo“, aŭ social-arhitekturismo.

sistemo al bezonsistemo. Kaj se estas, ekkaptu la okazon, ne kontraŭstaru al evoluo, helpu la tempon, kiu estas nia!"

Mi respondas je tio, ke eble tion marksanoj diros, tamen mi rezonas ne nur pri tio, kio ili diras, sed eble pli multe pri tio, kion ili fakte faras. Kaj mi nome demandos mian opozicianton: ĉu tio estas vera, ke neniam marksanoj deziras kaj celis nenigi la kapitalisman sistemon? Ĉu eble li neniam aŭdis pri la sufiĉe granda regno (preskaŭ 1/6 de tutmonda tero), nomita antaŭe Rusujo (hodiaŭ USSR), en kiu marksanoj, la gvidantoj, sufiĉe laŭte (tiam verŝajne eĉ surdaj homoj tion aŭdis) alvokis al la defaligo de kapitalisma sistemo en tuta mondo, kaj poste ili efektive en naturo tion plenumis, tamen nur en limoj de sola Rusujo en 1917? Sed eble li diros al mi, ke li ne opinias la "plulojn" kiel marksanojn. Tiam mi demandos lin, ĉu efektive tamen tuta marksisma propagando literaturo ne sufiĉe klare sopiras, aspiras kaj alvokas al tio? Eble li ankaŭ neniam aŭdis pri la final vortoj de la verko "Komunisma Manifesto" de la kredeble plej kompetenta marksano, nome Karl Marks mem: "Komunistoj ne opinias necese kaŝi siajn rigardojn kaj intencojn... Estu tremantoj la superregantaj klasoj antaŭ komunisma revolucio... ktp."

Ĉu tio estas ne sufiĉe klara alvoko al la defaligo de kapitalisma sistemo?

Sed ne nur marksanoj, mia estimata opozicianto mem sufiĉe klare kaj brile kontraŭdiras al si mem, nome li starigas tute kune jenajn du plene kontraŭajn laŭ sia interna signifo frazojn: "ne kontraŭstaru al evoluo, helpu la tempon."

Sed kiamaniere do oni povas helpi la tempon, ne kontraŭstarante al evoluo? Se la "evoluo" de naturo mem devas ĉion plenumi, pro kia do kaŭzo oni devas "helpi" al ĝi? Ĉu tiu "helpo" ne povas eble iam okazi maldezirinda kaj nepetita "ursa komplezo" laŭ la fabla de la fama rusa fablisto Krilev pri "Dezertulo kaj urso"?

Poste la opoziciulo asertas, ke esenco de anarĥismo estas ne "potenco" sed "natura bono de libereco" kaj li diras: "se oni donos liberan agadon al homoj, ĉiuj faros bone". Sed mi demandos, ĉu ne ĝuste vera estas tio, ke plena libereco nome estas tiam kaj sole tiam, kiam for estas potenco? Kaj eble li neniam aŭdis pri tio, ke la vorto mem "anarĥismo" devenas de du grekaj vortoj, "an" kaj "arĥe", kiuj signifas "sen" kaj "potenco"?

Plue la opozicianto parolas: "Pacifistoj ne estas tiaj naŭvuloj, kiuj diras: »forpeli militistaron!« Bedaŭrinde li mem neniel montras kion do pacifistoj efektive diras, sed mi persone bone scias, ke ekz. tre fama pacifisto, Leono Tolstoj, en sia broŝuro "Mi ne povas silenti" kaj en multaj aliaj tre multe parolas kaj predikas pri tio.

Poste li certigas, ke mia kritiko de la tri teorioj "ne estas sufiĉa". Sed li tute vane pri tio certigas, ĉar li mem devus kompreni, ke en la malgranda artikoleto certe ne estas eble ĉion elcerpi por doni "sufiĉan" kritikon de tri plej grandaj kaj plej seriozaj filozofi-politikaj teorioj en nia homara mondo.

En la dua parto de sia kontraŭdiro s-o Otto Bonte diras: "La venko ĉiam estas relativa: ankaŭ en milito. La militvinkinto neniam tute nenigas la kontraŭulon." Sed de kie la opozicianto prenis tiun tezon pri relativeco? Mi ja parolis tute ne pri relativeco de venko, sed pri relativeco de vero! Eble por li tiuj ĉi du aferoj estas plene egalaj, tiam certe li estas tute prava pri sia, ŝajnas, tro certigita deklaro, ke "filozofio dubos" pri interrilato de miaj tezoj al la ideo de relativismo kaj ke ĝi estas "pli granda seniluziigo" ktp. Tamen por mi mem konceptoj "venko" kaj "vero" estas ĉiukaze plene malegalaj.

Fine la opozicianto diras ankoraŭ "Sekve oni devas ĉiujn toleri, esperante, ke ilia kunagado fine atingos la relative pli pacan staton de la tero. La legantoj konfesos, ke tiu kompreno pli bone rilatas al la principo de relativeco". Mi respondos je tio, ke mi certe ne scias, kion la legantoj ekpensis pri la teorio de relativeco de s-o Bonte, tamen mi opinias, ke verŝajne ili ricevis neniajn faktojn en mia artikolo por supoz, ke mi alvokis ilin al elranĉado, pendigado k. t. s. de reprezentantoj de la tri montritaj doktrinoj kaj same de s-o Otto Bonte. (Dairigo sekvas.)

Tekniko.

Novspeca elektrejo en Francujo.

Franca Senato voĉdonis krediton por konstruo de la unua stacio por kaptado de la forto de maraj akvoj en Aber Wac'h (Finistère). Ĝi havos barilon de 150 metroj de longeco kaj 4 grupojn da turbinoj kaj disvolvanitajn fortojn de 75 ĝis 1200 ĉevalfortoj laŭ la energio kaj rapideco. La stacio estos ligita kun fabriko de dolĉa akvo sur la rivereto Diouris, kiu sin jetas en Aber Wac'h kaj ebligas la regulon de la energio. La maksimuma potenco estos 3200 ĉevalfortoj, la minimuma 1600. La jara produktado estos do 11 milionoj da kilowat-horoj egala al ekonomio 16500 tunoj da karbo.

Nova aviada movilo.

"Pravda" raportas pri elpensadoj de G. A. Geld, Prof. ĉe Leningrada teknologia instituto, estigonta grandajn ŝanĝojn en aertekniko. Ĝi estas aviadila motoro de nova speco, kiu laboras per nafto kaj estas funkciiga per helpo de komprimita aero. La nova motoro estas 10-oble pli malpeza ol la ordinara kaj multe pli ekonomia ol tiu.

R. L-on, Tallin.

Internacia trafiko.

Aŭtomata telefonstacio en Stockholmo.

La unua tute aŭtomata telefonstacio en Stockholmo estas malfermita.

Ĝi estas konstruita laŭ sistemo eltrovita de inĝeniero Axel Hultmann, kiu studis la problemon dum vojaĝo inter alie en Usono.

La stacio estas konstruita por servi al 10000 aparatoj. Oni intencas iom post iom transiri al aŭtomata telefon-servo por la tuta telefonreto en Stockholmo kun ĝiaj 100000 aparatoj.

La nova sistemo funkcias bonege. En la oficejo de Sveda Esperanto Federacio aŭtomat-telefono trovigas, kaj la skribinto tie havis okazon ĝin provi. Laŭ opinio de fakuloj la stacio devas esti la plej moderna en la mondo.

H. Halldor, Stockholm.

Scienco.

Mineralogio.

Denova trovo de plateno.

En Narim-regiono ĉe la enfluo de Jenisej estas trovitaj grandaj tavoloj de plateno.

Laŭ "Izvestija".

Foiroj kaj Ekspozicioj.

Foiro de Breslavo.

En la postmilita evoluo de orienta kaj suda Eŭropo la foiro de Breslavo ludas gravan rolon. Kaj tre prave la direkto de la foiro nun vidas antaŭ si novajn taskojn. Por plenumi ilin la foiro de Breslavo ĵus klopodadas kiel plej eble perfektigi sian sistemon de reprezentantoj en eksterlando. Krome ĝi penas, ke ankoraŭ dum la kuranta jaro per novkonstruitaj ebligis la envicigo de pluraj centoj da ekspoziciantoj, kiuj ĝis nun devas rezigni pro manko de okupebla loko. La proksima printempa foiro okazos de 19-11 marto nunjara. Por la poste okazonta teknika foiro kaj la foiro de agrikultura maŝino de 8-10 majo nunjara la foira direkto jam estas ebliginta pligrandigo de la okupebla loko je la duoblo de 1' nuna amplekso. Samtempe okazos 4-semajna fabrikteknika ekspozicio, kiu montros novecojn, kiujn kreis tekniko kaj scienco dum la lastaj jaroj por pli racia laborado. La aliĝoj al la printempa foiro (v. anoncon ET 181) jam nun pruvas, ke la venonta foiro sendube konformigos al la atendoj, kiujn oni supozas sur la vojo de pluevolado.

Kroniko.

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgojn (sen postkarto al aparta folio unuflanke skribita, sed ne inter administraj al privataj scilgoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legesibe (precipe nomoj)

Ĉeĥoslovakio.

Trautenu. La "Esperantogrupo Trautenu" havis la 12 febr. sian 3-an ĝeneralan kunvenon. La diversaj raportoj montris, ke la grupo bone funkcias kaj la movado progresas tie ĉi. Oni elektis s-on Dvořák kiel prezidanton, s-on Prof. Kriesch kiel vicprez., s-on Reeh kiel kas. kaj s-on Steinhauer kiel sek. En aprilo aŭ majo estos en Trautenu la XVII-a Laborkunsido de la Orientbohemiaj Esperantistoj.

Laborista Ligo Esperantista.

Arangis la 24 febr. ĝeneralan kunvenon en Laborista Domo "Peklo". Ĝeneralan kunvenon malfermis prezidanto s-ano Pešek J., kiu en sia antaŭparolo priskribis la tutan movadon de laboristaro dum la tuta jaro. Sekvis la raportoj de la funkcioj. S-ano Pech Jos. kaj Votrubeč paroladis pri utileco kaj pri propagando de Esperanto. Antaŭ elektoj dankis s-ano Pech Jos. al funkcioj por ilia peno, kiun ili alportis por disvastiĝo de Esperanto inter laboristoj kaj por LLE.

Kiel prezidanto de LLE estis denove elektata s-o Pešek J. Sekvis plua punkto de la programo kaj nome diversaj proponoj kiuj estis ĝenerale akceptitaj.

Tuj post ĝenerala kunveno okazis la komitata kunveno en kiu estis elektitaj jenaj samideanoj kiel funkcioj: s-ano Büchi V. I. vicprez., Hovopka J. II. vicprez., Král Jan., sek., s-ano Katoša Mejková, kas., Valés Fr. enskribisto, ges-anoj Tohrmanová M., Štadler, Proskovec, Kódl, Čeček, Venonta komitata komitato, Sádla, komitataro sen funkcio. Venonta komitata kunveno okazos 6 marto, kiam la malnova komitatoj transdonos sian funkcion al novaj komitatoj. La korespondantoj oni adresu al: Laborista Ligo Esperantista en Ĉeĥoslovakio, centro Plzen "Peklo". (Král, Jan.)

Francujo.

Dum la Lyonsa Foiro de la 1-3 marto okazos Internacia Sciencia Kongreso por disvolvigo de komerca rilatoj. La sekretario estas samideano, universitata Prof. Antonelli. La socio "Esperanto kaj komerc" sendis specialan raporton pri Esp.

La proksima franca esp. kongreso okazos en Strasbourg la 7-9 junio.

Dum la Lyonsa Foiro estis speciala Esp. Stando, sub lerta direkto de s-ino Farges.

Italujo.

Genova. La ĉi tiea "Laborista Esperanto Grupo" post la atako kiu suferis kelkaj ĝiaj anoj nun revigligas; ŝanĝis sidejon kaj nun ĝin havas ĉe la "Popolaj Vesperaj Lernejoj" (Genova Laborista Konfederacio, fondita de J. Mazzini) en Placo Embrice 5-5, kie kunvenas ĉiutage kaj ĉiuvendrede de la 20.30 h. ĝis la 22 h.

Ĉiu samideano vojaĝanta al Genova, estas varme petata viziti la LEG.

La nuna konsilantaro de la LEG estas jena: s-o Berna Giovanni, prez., s-o Managlia Ettore, sek. k. a. s-o Zucchini Silvio, vicsek., s-o Menichi Lorenzo, vicsek., Falcont Armando, bibli., s-o Bianco Ernesto, bibli., s-o Poggi Maurizio, helpanto, s-o Podesta Dario, sindiko, s-o Servadio Arturo, sindiko. Delegito de la "Itala Esperanto Federacio" estas s-o Ettore Managlia (relektita).

Praktika Esp. kurso por grupanoj okazas en la grupa sidejo ĉiutage kaj ĉiuvendrede vespere.

La LEG dabitigas la dissendadon de la de ĝi tradukita kaj eldonita (10000 ekz.) verko de Mazzini "Devo de la homo" sendante ĝin ankaŭ al la nuna itala registaro kaj aliaj aŭtoritatoj. Ĝi ricevis aplaudajn leterojn, kiuj enkadrigitaj estas publike ekspoziciitaj propagande en butik-fenestroj por altiri intereson de la publiko.

Rapidan kurson gvidis Prof. Don Facco en la Instituto Vittorio de Felire kaj baldaŭ malfermos praktikan kurson en la samaejo. Helpas lin la loka delegito de "Itala Esp. Federacio".

Prof. D. Facco nun gvidas elementan kurson ĉe la Vespera Teknika Lernejo "Vincenzo Ricci".

Jugoslavio.

Dubrovnik. La 16.3. Esperanta Klubo Dubrovnik kaj hotelbanaĵa socio "Epidaurus" aranĝas grandan eksp. kurson al Praha. Partoprenantoj el Bosnio, Hercegovino, Dalmacio kaj Montenegro.

Celo: vizito de Foirc, kulturaj kaj historiaj rikarkind-ajoj (muzeoj, teatroj, diversaj akademioid, kulturaligraj institutoj), grandaj industri-centroj ktp.

Pro tio oni kontaktigis kun "Internacia Foiro de Praha". Tiu kuraga entrepreno de ĵuna Esperanta Klubo Dubrovnik certe havigos grandan utilon al pensukeca Esperanto-propagando en Sud-Dalmacio. (M. Monić.)

Rumanujo.

Bukureŝti. La 16 febr. okazis ekzameno de Esp. kurso en la ŝtata liceo "Matei Basarab". La ekzameno prezidis s-o Constantinescu, direktoro de la lernejo, kiun agreble surprizis la flua esp. parolo de la liceanoj partoprenintaj la 12-lecionan kurson.

Caransebes (Banato). La 10 febr., dimanĉe vespere okazis propaganda kunveno en la "Katolika Kunveno". Ĉeestis ankaŭ est. ista delegitaro el Bukureŝti, salutita ĉe la stacidomo de Caransebes. En la kunveno propagandparolis s-o advokato D-o Horvath kaj la delegitaro bukureŝtj. Ĉeestis ĉ. 200 personoj, el kiuj multaj enskribiĝis al la nova kurso de s-o Edmundo Vincze, del. de UEA. S-o D-o Meizger, katolika paroĥestro, afable disponigis senpagan kursejon. En la hotelo "Verda Arbo" bankedo kun gaja esp. atmosfero finis la sukcesan prop. vesperon. Kiel gastoj ĉeestis ankaŭ s-o Emanuel Berger el Timiŝoara.

Lugo (Banato). La 11 febr. p.m. en la festa ĉambrego de hotelo "Dacia" estis propaganda kunveno ĉeestita de ĉ. cent personoj, inter ili s-o prefekto Cornean, s-o urbestro Harambaša, kaj ankaŭ la direktoro de la polico k.a. Prezidis s-o advokato D-o Horvath, prelegis kaj parolis s-o D-o Horvath, A. Ĉe kaj T. Morariu. La favora konduto de la estraro multe helpas la kurokomencajn laborojn de la fervora UEA-del. s-o E. Vincze.

Targu-Mures (Transilvanio). En la urba komerca lernejo s-o direktoro Diakonescu enkondukis Esp. kursojn, kiujn gvidas s-o Prof. D-o Kadar.

Rusujo.

Astrahani. 7 febr. k-do S. Soričev legis lecionon pri Esperanto al ĝejuulero de "Isolkom". — 1 febr Esp. rondeto el klubo de "Leŭt. Šmidt" transiĝis alian klubon de "Agit-Punkt" pro likvido de la unua.

En "Sovpartskolo" estos eldonitaj menskribita ĵurnalo kaj kursa gazeto kaj en ili ambaŭ estos lokigitaj priesperantaj artikoloj.

Pro malsaniĝo de k-do Stefanov, gvidanto de esp. rondeto ĉe la tramoficejo, tiu lasta ne funkcias.

Irkuŝk. Ĉiudimanĉo okazis kunveno de malnovaj parolpovaj esperantistoj, dum kiuj oni regule faras diversajn raportojn (postmilita esp. movado en Anglujo de Ŝvarc, "Homligevo Esperanto kaj ĝia evoluo, vidpunkto de komunismo" de Krjukov, "regnaj institucioj de Anglujo" de Ŝvarc k. a.). Loka ĵurnalist-komunisto N. Hreblovskij legas poĉapitre sian tradukon de fama revolucia romano "Ruĝa stelo" de Boganov.

Por plivigligi partian klubuvion gubernia komitato de komunistoj oficiale proponis fondi en la klubo rondeton de komunisto-esperantistoj.

Irkuŝk suferas pro manko de esp. lernolibroj.

(M. Krjukov.)

Tambov. En komenco de februaro en urba profesia-teknika lernejo, s-ano Anat. Volochov faris paroladon pri Esperanto. Ĉeestis multaj lernantoj kaj kelke da instruistoj. En mura gazeto de tiu ĉi lernejo A. Volochov regule lokigas artikoletojn pri Esperanto.

Granda memorfesto por Prelato Giesswein en Budapeŝto.

La Hungara Paca Societo por la Ligo de Nacioj aranĝis la 17 febr. dimanĉe en la budapeŝta komerca halo belan memorfeston je memoro de D-o Aleksandro Giesswein kun partopreno de la societoj, kies laboron li plej multe helpis. Prezidis unitaria episkopo Józán, kiu en la malferma parolo skizante la karakteron kaj laboron de Giesswein per belegaj vortoj esprimis, ke la pacamo kaj interkomprenigemo de Giesswein kondukis lin ankaŭ al akcepto de neŭtrala helpa lingvo, kiu estas taŭga por ĉiuj celoj, nur unu kredeble estas malebla per Esperanto: la malamo! Grandega aplaŭdo dankis la efikan skizon de esenco de Esperanto. Rev. episkopo Balházár diris la memorparoladon kaj post paroloj de reprezentantoj de feministaj kaj virinaj societoj en la nomo de la esperantistaro parolis anstataŭ la malsana Kalocsay D-o Lóránd bone klarigante, ke Prelato Giesswein vidis en Esperanto ne nur praktikan ilon, sed ankaŭ idealan kunigon. Li finis sian paroladon per poemo pro tiu celo verkita de D-o Kalocsay. La festkunsido decidis starigi laŭ testamento de Giesswein sur lian tombon la monumenton de la "Kristo de la Andoj", kies originalo staras sur la pinto de la Anda-montaro ĉe landlimo de Argentino kaj Ĉilio por memori la pacon post milito inter tiuj landoj: "la pacon super la landlimoj", al kies ideo oferis la nobla pastro sian tutan vivon. p. B.

Giesswein.

Memorpoemo de D-o K. de Kalocsay.
 En mondo de l' malamo kaj de l' armo
 Li estis amo, bono, vero, varmo.
 Li estis milda, lia rava mild'
 Por malfortuloj estis ŝirma ŝild'.
 Por baraktantoj de la vivo ŝvita
 Li estis plena mano etendita.
 Li estis forta kun magia for'
 De l' bona ago kaj de l' bona vorf'.
 Li estis arma, kiel la infano,
 Li estis simpla, kiel mola pano.
 Serena, kiel la ciel' radia,
 Kaj estis nia, ho, li estis nia.
 Jes, nia, nia patro kaj patrono
 Kun sia tuta koro kaj sindono.
 Ce patro tomo staras ni, la filoj,
 Ne hontu ni pri niaj larmobriloj!
 La tuta mond' pli frosta estas nune:
 Ve, ne varmigas lia koro sune.
 Sed nin konsolu, fratoj, en ĉagreno:
 Foriris li, sed restis lia beno.
 La noblaj semoj jam en koro ĝermas,
 La frosta tomo ilin ne enfermas.
 Kreskigu tiujn noblajn semojn, fratoj!
 Jen testament' de liaj korobatoj.

Pri kelkaj Fundamentaj esprimoj.

Lastatempe oni tre ofte uzas ekvacion por klarigi arbitre enkondukatajn nekompreneblajn vortojn kaj esprimojn, tute malproprajn al la esenco de Esperanto. Ĉi tiu tre moderna ekvacia sistemo montras, ke multaj esperantistoj ĝis nun bedaurinde konas nek la Fundamenton, nek la tri grandegajn principojn, sur kiuj staras la tuta konstruaĵo de Esperanto. Ĉi tiuj principoj nomiĝas: internacieco, neceseco kaj sufiĉeco, kiuj ĉiam akompanis D-on Zamenhof dum la kreado de la lingvo. Jen kial nun tre ofte ni aŭdas disputojn pri tio, el kiu lingvo devenas tiu ĉi aŭ tiu esperanta vorto; kaj diversaj naciaj rigardas la vortojn prenitaj ĝuste el ilia lingvo. Ĉi tiun aperon kaŭzas la unua principo — internacieco de Esperanto. Se iu vorto aŭ esprimo ne estas pli malpli internacia kaj komuna samtempe al kelkaj lingvoj, ĝi almenaŭ devas enhavi sencen de sufiĉeco kaj neceseco, kio faras la koncernajn vortojn kaj esprimojn logikaj kaj facile kompreneblaj samtempe al diversaj naciaj.

Eble oni opinias, ke ĉi tiu supre menciita „ekvacio“ de Esperanto estas ĝia idiotismo, pligrandiganta ĝiajn ĉefajn principojn. Sed ŝajnas al mi, ke, se Esperanto havas siajn idiotismojn, ili ne devas esti malfacile kompreneblaj, simile al idiotismoj de naciaj idiomoj; sed male — ili devas esti facile kaj tute senpene kompreneblaj al diversaj naciaj.

En la unua libro de la lingvo Esperanto D-o Zamenhof diras: „En la lingvo internacia vi povas esti iuj komprenita de membro de ĉia nacio, se li ne sole ne posedas tiun ĉi lingvon, sed eĉ neniam aŭdis pri ĝi. Ĉiun libron, verkitan en la lingvo internacia, libere povas, kun vortaro en la mano, legi ĉiu...“ Se ni malfermas la Universalan Fundamentan Vortaron kaj rigardas, kiajn signifojn havas en diversaj lingvoj similaj vortoj, kiel: ajn, kiu ajn, ĉiu, iu, ĉe, al, jam, ankoraŭ, kazo ktp., do ni vidas, ke ili havas la signifon, kiu samtempe estas propra al diversaj lingvoj. Se ekzemple la vorto „ĉe“ france signifas „chez“, kiu en la franca lingvo havas duoblan signifon —

1. de ĉesto: nous sommes chez nos amis, kaj 2. de direkto: nous allons chez nos amis, — dum en aliaj lingvoj la vorto „ĉe“ havas nur unu solan signifon de ĉesto (germane „bei“, ruse „u“, „pri“) kaj se por esprimo de direkto en Esperanto oni havas tute aliajn vortojn — „al“ (germane „zu“, ruse „k“) aŭ „en“, tiam, kompreneble, la logikeco postulas, ke ĉe la uzado de la „ĉe“ kaj „al“ oni atentu la proprecojn de diversaj lingvoj koncerne la uzatajn vortojn.

Nun mi demandas, ĉu ekzistas multe da lingvoj, en kiuj la vorto ŝamsignifa al esperanta „ajn“ estas uzata kun la resp. naciaj signifoj de „ĉio“ kaj „io“, kiel oni tre ofte kontraŭfundamente uzas la vorton „ajn“? Ĉu la nefundamentaj „ĉio ajn“, „io ajn“ ne estas pli bone kaj prave anstataŭataj per „kio ajn“ aŭ per simpla: „ĉio“, „ĉio-kio“?

Aŭ kiamaniere laŭ la Esperanta Vortaro ni povus konstati, ke la esprimo ne jam = ankoraŭ ne? En la Fundamenta Vortaro la vorto „ne“, ekzemple, germane signifas ja „nicht“ kaj „jam“ = „schon“ kaj la tuta esprimo „ne jam“ estas tradukebla per „nicht schon“ (schon nicht!), dum la vorto „ankoraŭ“ signifas „noch“ kaj nacilingve oni ja ne uzas „nicht schon“ = noch nicht! Kial do ni per la ekvacio devas plikomplikigi kaj plimalfaciligi kompreneblecon de la lingvo?

Alia ekzemplo. La klasika latina „casus“ enhavas tutan dekon da signifoj. Dume en kelkaj lingvoj oni uzas „kazus“ (lafina „casus“) nur en senceno de iu „okazo“ aŭ „okazintaĵo“, sed en aliaj en senceno de okazo kaj deklinacia finiĝo „kazo“ (kaj ankaŭ en kelkaj signifoj).

Genio de Zamenhof, gvidata de la tri ĉefaj principoj de la lingvo, prudente apartigis la Babilonurajn signifojn de la prototipa latina „casus“. En Esperanto ilin anstataŭas apartaj vortoj kun tre difinitaj signifoj. Malgraŭ tio, oni tre ofte uzas la vorton „kazo“ — kiu en Esperanto havas tre difinitajn signifojn de deklinacia finiĝo — en malĝusta senceno, malpropra al ĝi, ĉar la esperanta „kazo“ nenion komunan havas kun la „okazo“.

Fine mi dezirus scii, ĉu iu trovis en la multegaj personaj verkoj de Zamenhof — kiuj ja preskaŭ de ĉiuj esperantistoj estas rigardataj kiel prototipaj — similajn esprimojn, kontraŭ kiuj mi „batalas“ en mia artikolo. —

Pli da logika konsekvenco en la uzado de la lingvo! . . .
 Adolf Vinson, Tallinn, Estonio.

Esperanta etimologio.

De D-o Roberto Marauy, konsulo de Iŝa kaj Teko por Hispanujo, Salamanka.

Sub tiu titolo aperis en n-o 174 de ET interesa artikolo de D-o Vilmos Austerlitz, pritraktante la devenon de diversaj esperantaj sufiksoj. La verkinto ĝentile petis al la diverslingvaj s-anoj klarigajn notojn rilate sian liston.

Jen miaj notoj rilate la hispanan (kastilan) lingvon:

DIS-: Hispanaj vortoj: *discuir* (diskui), *discordia* (malakordo), *disgregar* (disigi), *dislocar* (elartikigi), *disidir* (disakordi), *discrepar* (disopini), *discontinuidad* (interĉesigo), *disociar*, *distar*, *distender*, *distribui*.

EK-: *Ex-clamar* (ek-krii).

EKS-: *Expresidente*, *exdixutado* ktp.

GE-: *Gestación* (gravedeco), *germinar* (ĝermi), *genésico* (seksa), *genérico* (komuna).

sferon de sia arto tiel malproksimen kaj larĝen kiel Dvořák, kiu per tio plej bone plenumis ankaŭ la deziregojn de sia tempo pri valorigo en mondo.

Al vera naturekzameno nia muziko devis sin submeti tiam, kiam de ekstere atakis ĝin novaj influoj kaj kiam al ĝi estis donitaj eĉ novaj taskoj interne, ĉar ĝi nun montris, ke el la fundamente, kiun al ĝi donis Smetana, povas ĉiam kaj ĉiam ekfloradi eĉ ĝia estonta vivo. — Kaj tiun ekzamenon nia muziko brile plenumis. —

Se la evoluo de mondmuziko, ĉefe rilate teknan vidpunkton, estis tro rapidega en lastaj dekjaroj, la bohema muziko tamen povis progresi samrapide. Kaj ne nur en imitado de tio, kion nova muziko alportis, sed ankaŭ en propra eltrovo de novaj rimedoj, tiel ke eĉ en tio staras nia muziko samvalora apud muziko de nacioj plej grandaj kaj pro tio ne malpli povas esti instruisto por aliaj. —

Ankaŭ en tiu ĉi bolanta turniĝo de nova tempo la bohema muziko konservis al si sian kaj boheman spiriton, rigardante nur al celoj idealaj. Tio estas inda por arto vere nacia. Do la merito tiu estas ja pli granda; des pli neideala spirito de tempo, enkorpiĝinta en muziko en t. n. verismo kaj impresionismo, troprenigis eĉ arton de nacioj ĝis tiam plej seriozaj, tiel ke nur per laboro de ĉiuj moralaj fortoj rezistis nia muziko tiun mondfektiĝon. Ne malpli granda danĝero estis ja eĉ en troa valorigo de plej konsekvenca individualismo en arto de tiu ĉi tempo, ĉar nun ĉiuj sentoj kolektivaj, en kiuj nacia arto trovas ĉiam sendanĝeran apogilon, estis preskaŭ principe esceptitaj el arto. Kaj tamen en tiu ĉi individualisma mondo bohema muziko povis paroli en konsento

MAL-: *Maleducado* (maledukita), *malaventuro* (malfeliĉo), *malsano* (malsana), *malquerer* (malami) ktp.

RE-: *Reeditar* (reeldoni), *releer* (relegi), *relegir* (rezelekti) ktp.

AD-: *Reinado* (regado), *galopada* (galopado), *trotada* (trotado), *granizada* (hajlado), *helada* (frostado), *parada* (starado) ktp.

AN-: *Zaragozano*, *Mahometano*, *Darwiniano* ktp.

AR-: *Castanar* (kaŝtanbarbo), *pinar* (pinaro), *olivar* (olivarbaro), *maquinaria* (maŝinaro), *vocabulario*, *diccionario* (vortaro), *silabario* (silabaro), *devocionario* (preĝaro), *ideario* (idearo) ktp.

EBL-: *Posible* (ebla), *legible* (legebla), *creible* (kredebla), *comestible* (manĝebla), *habitable* (loĝebla) ktp.

EC-: *Rapidez* (rapideco), *dureza* (malmoleco), *gentileza* (ĝentileco), *estupidez* (stupideco), *riqueza* (riĉeco) ktp.

EG-: Vortoj de greka deveno: *Acromegalia*, *megafono*, *megaferio*, *megalomania*, *megalítico*, ĉe kiuj *eg* ĉiam signifas ion grandan.

EM-: *Embaucar* (altriri), *embelesar* (emigi), *embelecar* (emigi), *embudo* (funelo), *empeno* (dezirego), *encanto* (ĉarmo).

ESTR-: *Maestro* (majstro), *burgomaestre* (urbestro), *estrado* (estrejo).

ET-: Diminutiva sufikso en hispanaj dialektoj (kataluna, valencia, baleara kaj aragona).

ID-: *Seleucid* (idoj de Seleŭco), *Abbasidas*, (idoj de Abbas), *Danaides* (idoj de Danae), *Israelita* (Izraelido), *Mogrebita* (Mogrebido), *semita* (semido) kaj aliaj vortoj el greka kaj semida deveno.

IL-: *Martillo* (martelo), *tomillo* (ŝraŭbo), *utensilio* (ilo), *cepillo* (broŝo, rabotilo), *cuchillo* (tranĉilo), *buril* (gravurilo), *atril*, *candil* ktp.

IN-: *Herolina* (herolino), *reina* (reĝino), *gallina* (kokino), *Guillermina* (Wilhelmino), *zarina* (carino).

IST-: *Telegrafista*, *modista*, *maquinista*, *maurista* ktp.

Mi deziras, ke alilingvaj s-anoj daŭrigu tiun laboron, per publikigo de similaj listoj; kies kolekto estus interesa por helpi la studadon de la mirinda verko de nia majstro.

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj artikoloj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin iun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaŭgajn artikolojn.

260. Rilatas 255. Fundamento Esperanto.

S-o Andrejev plendas ke esperantistoj verŝajne ne posedas kaj ne sin inspiras al Fundamento. Li valorigas sian dirojn per teksto, sed iom antaŭe la Fundamento mem diras ankaŭ: „La Fundamento de Esperanto“ tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto. Ho ne! Ĝiu volas perfektigi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, multe pli bonajn kaj pli vastajn, kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte...“

Nu: se la lernolibroj kaj vortaroj aludataj taŭgas por lerni kaj perfektigi en Esperanto, kia neceso ekzistas por konstante rigardadi la neperfektan Fundamenton? Se tiuj libroj estas pli vastaj, ili certe kuntenas ankaŭ la fundamentaĵojn, kaj se ili estas pli bonaj, certe ne devas enhavi mankojn de la Fundamento.

Do, mi konkludas, al posedantoj kaj uzantoj de pli bonaj libroj, ke la Fundamento estas malutila eĉ domaĝa, ĉar ĝi povas lernigi malbonaĵojn.

Al tio oni devas aldoni ke nun la vortaro de la Fundamento estas malkorekta eĉ multaj tradukoj, kiujn oni reviziis kaj ankaŭ faris aldonojn de korektoj.

kun spirito nacia kaj do ne malpli boheme ol sietempe en mondo patriota kaj tutnacia. Tio ankaŭ estas ĉefaj meritoj de tiu pli juna generacio, kiu havis honestan kaj respondecan taskon alvenigi nian muzikon el altaĵoj de altintenseco de nia renaskiĝo trans ebenaĵojn de jarcenta fino en novan tempon, kiu kuŝas antaŭ ni. Ili estos kunligitaj kun nomoj de Zd. Fibich, kiel unua antaŭbatalanto de tiu ĉi generacio, de Jos. B. Foerster, kiel plej individua, sed ankaŭ plej honesta ĝia majstro, de Jos. Suk, kiel plej kurageza ĝia eltrovanto teknika, de V. Novák kaj O. Ostrčil. Kun tiuj ĉi nomoj kaj fortoj eniras bohema muziko en novan, estontan tempon. Kia ĝi estos — neniu el ni povas eldiri, ke li ne scias tion; sed certe tiu estos la tempo de forto. La „Vendita Fianĉino“ estas unua muzikverko de Smetana fluspeca kaj do unua moderna komika opero en mondilituro, kiu ŝaltenlevas komikon en sferon de pli alta moderna muziko kaj uzas preferaĵojn, kiujn donis al ĝi moderna muziko. —

„V. F.“ portas precizan bildon de bohema vivo kaj kulturo. Ĝia uverturo per si mem jam estas unu el la plej bonaj mondiaj muzikverkoj. Ĝia viva tempo-mezuro prezentas al ni klare vivobolantan, vigan humoron de kampara vivo, kaj en potenco grado eminentiĝas ĉefmotivo de teatraĵo — kontraktio pri fianĉino. Ĝojokanta melodio de enkonduka horo „Kial ni ne ĝoj-sopirus“ plimultigas bonhumoron kaj ekkiptas animon de geaidantaro. Motivo de fidela amo Inter Joĉjo kaj Manjo belsonas en „fidel amado“ kaj finsonas super kortuŝa adiaĵo. — La „Vendita Fianĉino“ estas artiste kaj same historie granda verko, portanta gloron de Smetana kaj bohema muziko ne nur ira la tuta enlando, sed ankaŭ en fremdajn landojn.

Post Smetana.

Originale de J. K. Kopecky, Rychnov n. Kn.

Bohema muziko post Smetana vivas ĉefe el grandaj postlasaĵoj de sia majstro. En muzika vivo efektiviĝas tio, kio ne estis atingebla en tempoj de Smetana, kvankam oni bone komprenis signifon de tio. Estas malfermita Nacia Teatro, kie bohema opero povis plene disvolviĝi. Oni fondas memstaran boheman filharmonian orkestron, kiu povis alporti eĉ al nia koncertvivo ĝian disvastiĝon. Ekstis ĝia bohema kvarteto, kiu prosperigas la staton de niaj koncertoj; disvolviĝas bohema muzikliteraturo, libra kaj ĵurnala. En tio ĉio ja estas nenio ideo nova, kion ne konus la tempoj de Smetana, sed ankaŭ tiu ĉi pliperfektiĝo de situacio en nia muziko signifas tamen progreson kaj pruvis, ke ankaŭ la posteuloj komprenas bonege la testamenton de siaj antaŭuloj. Ankaŭ sekvanaj niaj komponistoj ĉerpas multe kaj senĉese el Smetana. Amliĝis al li jam multaj liaj samtempuloj, jam tial, ĉar ili estus nepre sukcesantaj ĉe lia granda aparaĵo. — Tiel certe Bendl, Blodek kaj aliaj estas allogitaj de ekzemplo de Smetana por krei verkojn en stilo pli alta kaj bohema. Sed nur unu el ĉi tiuj alvokitoj estas ankaŭ elektita: Ant. Dvořák, ĉar nur li havis forton por enigi en siajn verkojn parton de nacia animo kaj tiamaniere fari ilin vivantaj en vivo de nacio. Li scipovis, eĉ laŭ ekstera vidpunkto, plej bone ekspluati el potenco renverso, kaŭzita de Smetana, kaj doni al sia arto eĉ amplekson, konformiĝantan jam al rapidevoluo de nia muzikvivo. Jes, en tio Dvořák ja fariĝis eĉ plej tipa aparaĵo en nia nova muziko, ĉar neniu el niaj bohema muzikverkistoj disvastiĝis la

Pro tio la Fundamento nun povas esti konsiderata nur historia dokumento de nia lingvo por spertuloj. Tio almenaŭ ĝis kiam oni faros eldonon tute perfektan kaj fidindan.

Por batali kaj venki nuntempe oni bezonas modernajn armilojn!

Asocio de germanaj instruistoj esperantistaj.

Bonkoraj eksterlandaj samideanoj sendis al mizeraj infanoj en kelkaj lokoj de nia lando monon, nutraĵojn aŭ helpos aliamaniere. Sendajtoj alvenis el Ĉeĥoslovakio, Danujo, Svedujo, Finnlando, Holando. Kelkaj gesinjoroj petis min, ne publikigi iliajn nomojn. Tial mi ne citas nomojn. Speciale menciinde estas, ke ankaŭ francaj instruistoj esperantistaj aranĝis monkollekton por germanaj infanoj kaj sendis grandajn sumojn al kelkaj lokoj de nia lando.

La Asocio de germanaj instruistoj esperantistaj A. Sohrmann, Weinböhla-Dresden, prez.

Grava! Atentu!

Genova (Italio). La loka „Laborista Esperanto-Grupo“, cele memorigi la 50-an mortdatrevenon de la granda itala pensemulo Jozefo Mazzini (10 marto 1922), tradukis esperante kaj presigis lian faman verkon „Devoj de la homo“ kaj ĝin dissendis senpage al la esperantistoj kaj autoritatoj en la tuta mondo. Tiu samideanoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis la libron, povas ĝin peti ĉe la „Laborista Esp. Grupo“ kaj, ĉar ni intencas sendi ĝin ankaŭ al eksterlandaj bibliotekoj, ĉiu delegito de UEA estas varme petata sendi al la LEG adreson de fama kaj konata biblioteko de sia loko.

La „Devoj de la homo“ estas senpage sendota al ĉiu, tamen oni antaŭdankas tiun samideanojn, kiuj bonvolos sendi ankaŭ malgrandan monferon (ĉu per nacia mono, ĉu per ĉeko) por subteni la grandajn poŝtelspezojn, adrese: ĉion al s-o Ettore Managlia, sekretario-kasisto de la „Laborista Esperanto-Grupo“ Casella Postale 922, Genova, Italio.

KOMERCISTOJ
sendu
tuj materialon por la venonta
numero de „Internacia Komercisto“

Al niaj legantoj.

La intertraktoj inter la franca Regio kaj la germana Regna Fervojo fine atingis rezultaton, tiel ke post nelonge la fervojoj kaj poŝtaj interrilatoj denove funkcios regule. Tiam ankaŭ ET atingos siajn abonantojn denove regule kaj sen malfruigo.

Konformigo de nia entrepreno al la nova ekonomia situacio en Germanlando, translokigo de la ET-kontoroj en novajn, pli grandajn ejojn kaj aliaj teknikaj cirkonstancoj bedaŭrinde malebligis al ni en februaro eldoni numeron de „Revuo“. Rekomence la abonantoj ricevos en marto aŭ aprilo du numerojn de „Revuo“.

Cetere ni esperas, ke post kelkaj monatoj ni povos entute pliperfektigi ET, pro baldaŭ estiĝontaj pli favoraj teknikaj aranĝoj en nia presejo.

Se vi bezonas Esperantajojn

postulu la riĉnhavan katalogon de
n: niaj multe ŝatataj eldonaĵoj!

(Lerno- kaj ekzercolibro, vortaroj,
literaturaj verkoj ĉiuspecaj,
insigno, propagandiloj ktp.)

Abonu nian gazeton Germana Esperantisto!

La plej malnova el ĉiuj ekz. Esp.-gazetoj.
Ni liveras akurate kaj al ĉiuj landoj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel
Berlin SW 61, Wilmstrasse 5 (Germanujo)

La Batalanto
Eldonejo
Hannover
(Germanlando) Hermannstr. 19
serĉas interrilatojn
kun aliaj eldonejoj kaj librovendejoj
kaj reprezentantojn en ĉiuj landoj.

Atentu! Gravel

Por librejoj kaj Esp. grupoj.

La sekvantaj libroj de famaj aŭtoroj
kiel Zamenhof, Kabe, Grabowski, Leono
Zamenhof ktp. estas enkvante haveblaj.

Mi vendas ankaŭ la tutajon!

- 1. En fumelo de Opio de Kabe 156 ekz.
2. Al mokantoj 170
3. Mia Liro de Leono Zamenhof 125
4. Alitunaj agordoj 129
5. Nova Antologio 33
6. La Negro 20
7. Historiofilo de Lingvo Internacia 30
8. S-o Tadeo de Antoni Grabowski 30
9. El Parnaso de Popoloj 25
10. Linuaj Paŝoj 10
11. Verda Fajro 25
12. Protestilas kaj Laodamia 20
13. Plena verkaro de Devyatinn 20
14. Arkolektoj de Pola Esperantisto 7
15. Lernolibroj por poloj 300
16. Lernolibroj por hebreoj en lida jargono 100
17. Lernolibroj por hebreoj (antikva-hebreaj) 140
18. Fraŭlino Zuzanno 8
19. Lastaj tagoj de D-o Zamenhof 40
20. La radio de Rönngen de Kabe 15
21. Esperanto verfarado 20
22. La ĝemo de la vivo 18
23. Morfuri Vos Salutari 30
24. Hungara Poemaro 20
25. En Svisujo 10
26. Esperanto et Croix Rouge de Bayol 6
27. Kurso pri teologio 7
28. Gufeto da lakto 25
29. Improvizacio 5

Pro detaloj, prezo ktp. skribu tuj al:
A. Oberrotman, Krak.-Przedm. 10
Warszawa (Polujo).

Oficejo por
Internacia Komercisto
Willi Ekert
peradas ĉiuspecajn negocajn
peradas aĉetantojn kaj vendistojn
peradas komisionojn kaj vendas mem
Roonstr. 17, Wilhelmshaven (Germ.)

Ni serĉas perfektan, diligentan
Maŝinkompostiston
je Linotipo (simpla)

por la kompostado de ET kaj de germanlingva
jurnalo. Kondiĉo: sufiĉa scipovo de Esperanto.

T. & H. Jung, Horrem b. Köln

Anoncetoj.

Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĉigo, edziĝo, morto, okaz-
ontaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage.
Aliaj anoncetoj, nur akcepteblaj por minimume du sinsekvaj entreprenoj,
kostas po de entreprenoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de
ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj, ĉe kiuj ni povas de-
preni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propra anonceto preferan
prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2—mk., prefera prezo
por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas elveti 12 tagojn antaŭ
publikigo.

FIANĈIGO. S-o Johano Farkas, Prof. en Bukureŝti
(Rumanujo) kaj f-lino Etus Tarnoy, Prof-ino en Lugoj
(Rumanujo, Banato), gefianĉigis. [1]

POR ESPERANTA LIGILO. Pasintan Kristnaskon nia
samideano s-o Hurler, donacis tre interesan, bele bind-
itan libron al ni nomata „Por la batalilojn!“, bonega
esperanta traduko de fama romano „Die Waffen nieder!“
de Berta von Suttner. Kiel eble jam ĉiuj scias, „Esper-
anta Ligilo“ bezonas multan malhelpon kaj tial ni decidis
lofti tiun libron je la profito de iu gazeto. Ni havas
kvindek lotojn po duono da ormarko la loto minimume.
Kiu deziras preni lotojn, sendu la monon, do minimume
duonon da ormarko po loto, al ges-oj Zapater, Molkestr.
101, Köln am Rhein, Germ. [2]

BANKFIRMAO, INTERNACIA KOMERCO AŬ INDUSTRIO.
Dana bankisto, kiu je 1 aprilo forlasas sian nunan po-
zicion ĉe bankfirmao en Auerbach, serĉas novan en
Germanujo, Francujo aŭ Anglujo. Parolas la germanan,
anglan, skandinavan kaj la esperantan lingvojn. Turnu
vin al s-o Hugo Gerisch, Auerbach (Vgll.), Germ. aŭ al
del. M. Mammen, Grena, Danujo, aŭ al bankisto H.
Madsen, Kaisersstr. 16, Auerbach (Vgll.), Germ. — 15-jara
sperteco. [2]

RAPIDU! Por likvido estas disvendata kun 50% rabato
la lastaj cent ekzempleroj de la interpresaj verkoj: La
bulgara lando kaj popolo 2 sv. fl., El la proksima
oriento 1,25 sv. fl., Bulgara — Esp. kaj Esp. Bulg. Vortaro
2 sv. fl. Ĉiuj kune nur por 5 sv. fl. frankite. La
unaj dudek kvin mendintoj ricevos aldonon „Bukedeto“
kun antaŭparolo de Marie Hankel. Mendu tuj ĉe
la aŭtoro: Iv. H. Krestanoff, Wintergartenstr. 9, Dresden A. 16,
Germanujo. [2]

INSTRUISTINO de Supera Realternejo serĉas pozicion en
alianda familio. Alia instruistino deziras pasigi la tu-
ĉ-jaran libertempon en fremdlanda familio; estas preta
kiel rekompenco doni lecionojn aŭ akcepti aliandan
sinjorinon en sia domo. Adreso: F-lino Paula Reineke,
Humboldtstr. 45, Elberfeld, Germanujo. [1]

LETERVESPERO. La Esp. grupo „Obslne antaŭen“,
Os'is'r. 28/2, Euskirchen, Germ., aranĝos letervesperon.
Skribatoj estas petataj ĝis plej malfrue la 1. de aprilo.
Ni respondos al ĉiuj. [1]

ITALA DOKTORO pri ekonomi-komercaj sciencoj, fraŭlo,
24-jara, tre volonte sin okupas ĉe granda industrio kiel
kontrolanto aŭ ĉef-librotenisto, aŭ kiel administranto ĉe
grava riĉa familio, aŭ ĉe serioza instituto kiel oficisto.
Eksterlandanoj sendu tuj proponon esperante, itale, france,
aŭ angle al D-o Vito de Benedetto, del. de UEA, Lecce,
Sud-Italujo. [2]

GEEDZOJ serĉas postenon kiel instruistoj, por levele kaj
gladejo en fabriko por novaj virĉemizoj en eksterlando.
Josef Smolik, Mossiggasse 31/17, Wien 3, Parolas germane
kaj slave. [1]

Korespondejo kaj Interŝanĝo.

Al miaj korespondantoj: Bonvolu resendi viajn adresojn.
Miaj biblioteko kaj adresoj forbrulis en granda fajro en
Rabaul. Mihaelo Ahang, Box 54, Rabaul, New Guinea,
via Australio. [2]

Mi deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj de la tuta mondo,
speciale Turkujio. Alois Miksche, Flurschützstr. 10-17,
Wien 12, Aŭstrio. [2]

S-o A. Meeus, Appelstraat 57, Borgerhout, Antwerpen, Belg-
ujo, deziras korespondi kun usonaj, preferu kaliforni-
aŭ fraŭlinoj per il. pk. [2]

S-o Konstantino Smirnov, Sokolniki, Ogorodnaja 22,
Moskva, Rusujo, deziras korespondi kun aliandanoj
pri turismo, literaturo, librotekado kaj interŝanĝi per
gvidlibroj, ĵurnaloj, fotografaĵoj, pk., esperantaĵoj ktp.
Respondas ĉiam akurate. [2]

S-o G. C. ter Morshuizen, Dibbetsstraat 56, Hago, Nederlando,
deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. kun la tuta mondo.
Mi respondos kiel eble plej baldaŭ. [2]

S-o Antonio Balaz, Telegrafacento, Santa Clara, Kubo,
deziras interŝanĝi il. pk. kaj l. kun gesamideanoj de la
tuta mondo. Mi serĉas seriozajn gekorespondantojn.
Mi ĉiam respondos. [2]

Esp. gelernantoj (12—25 jaroj) deziras korespondi kaj
interŝanĝi per il. Pk. Pm. kaj l. kun la tuta mondo.
Skribu unue al Walter Grober, instruisto, Naundorf b.
Lauchhammer (Germanujo). [2]

F-lino Bice Jerrari, Corso Vittorio Emanuele 10, kaj f-lino
Anna Ballini, Via G. luigi 10, Mantova, Italujo, deziras
korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj per il. Pk. kaj
l. pri ĉiutaga vivo [2]

Du novaj samideanoj, gimnazianoj, deziras interkorespond-
adi kun gesamideanoj de la tuta mondo. Stefan Petrov,
Aleksandrovska 115, kaj Nikola Zazaron, Of. bulevardo
89, Rusĉuk, Bulgarujo. [2]

Por 50 geknaboj 13—16-jaraj el diversaj kursoj oni petas
korespondantojn per il. Pk. kaj l. Sin turni al s-o M.
Racoux, instruisto, Place Sommeleville, Verviers, Belg-
ujo [2]

S-o M. Bräunlein, Gugelstr. 21, Nürnberg, Germ., deziras
korespondi k. ĉ. l. per pk. kaj l. Mi sendas monon kaj
pm. Tuj respondu! [2]

Juna baletistino (25 i.) deziras korespondadi kaj estos
dankema, se oni sendos mod-jurnalon de vintra sezono.
Ruslando, Bobruisk Min. Gub., Socialistiĉeskaj 198. [2]

S-o Erich Sackwitz, Karlstr. 11, p., Merseburg (Saale),
Germ., deziras korespondadi per l. il. pk. kun ĉiuj landoj
pri interesaj temoj. Interŝanĝas helmonon. [2]

S-o Ewald Schwarzkopf, Hallesche Str. 3, 1, Merseburg
(Saale), Germ., deziras interŝanĝi papermonon el ĉiuj
landoj kaj fotografaĵojn de la gesamideanoj. [2]

Mi serĉas korespondantojn por aro da infanoj, lernantoj
de 8-a popollerneja klaso. De la sukceso de l'kore-
spondado dependas la starigo de pluraj kursoj. Skribu
tuj al s-o Rob. Pfennigwerth, Buchhandlung, Hirschfelde
i/Sa. Germ. [1]

6 svedaj gejunuloj: Em. Söderlund, Arv. Lindberg, H. Felt,
Ragnar Lindkvist, Torsten Dahl, f-lino Emma Lindberg,
ĉiuj en Mockfjärd, Svedujo, deziras korespondi kun la
tuta mondo. la knaboj preferu kun knabinoj. [1]

Tri amikoj deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. gesam-
ideanoj de la tuta mondo per il. pk. kaj papermonon.
Ĉiam respondos. Adreso: Anton Kossendey, Pann-
schoppenstr. 30, Buer-Beckhausen (Westf.), Germanujo. [1]

Tri junaj samideanoj deziras interŝanĝi leterojn, pm., ktp.,
precipe kun samideanoj. Adresoj: Z. V. de Castello,
Smetovni 11, Praha 3, J. E. Slavek Chodsk 14, Praha-
Žižkov, J. Svarovsky, Vlaska 11, Praha 3, Ĉeĥosl. [1]

Malkareli Por 1 sv. fl., aŭ egalvaloro mi elsendas 15
sovdruŝojn plus 10 polaj Pm. Ĉiuj diversaj, bonkvalitaj,
medikaj, Plenaj serioj! Isaj Drajter, Muranowska
26/52, Warszawa, Polujo. [2]

F-lino Gers, el Antwerpen kaj ĉiuj gelernantinoj, nepr-
e respondas al la samideanoj, kiuj jam skribis, sed ili ne
plu deziras novajn korespondantojn. S-o M. Van den
Bussche kaj H. De Cuyper, rue de Fourneau 40, Berchem,
Anvers, Belgujo, deziras korespondi kun la tuta mondo
per il. pk. kaj l. [1]

Por perfektigi mi deziras korespondi kun gesamideanoj
tutmondaj kaj interŝanĝi il. pk., pm., ĵurnalojn, katalogojn
kaj fotografaĵojn. Adreso: S. Sidki, Hancharloglu,
Konia, Azio, Turkujo. [1]

Mi deziras korespondi kun seriozaj samideanoj de la tuta
mondo per pk. kaj l. Mi ankaŭ serĉas negocajn rilatojn kun
aktivaj komercistoj. Skribu al Rob. Pfennigwerth, libreo,
presejo kaj liverejo de kontor-bezonajoj, Hirschfelde i/Sa.
Germ. [1]

S-o Pekny Jozef, Podgersz, Fabr. Bielizny, Krakow, Polujo,
deziras korespondi per il. pk. kun gesamideanoj de la
tuta mondo. Respondos ĉiam. [1]

F-lino Renée Huguet, 72 ave. Jules Dufaure, Saintes
(Charente Inférieure), Francujo, deziras korespondi kun
aliandaj geesperantistoj per il. pk. [1]

S-o Albin Berthold, Lindenstr. 11, 5, Merseburg (Saale),
Germ., deziras korespondadi per il. pk. kun ĉiuj landoj. [1]

S-o Arno Fischer, Kurze Str. 8, Neuvösben b. Merseburg,
Germ., deziras interŝanĝi il. pk., pm., kun ĉiuj landoj. [1]

F-lino Lucie Rabe, Dammstr. 7, Merseburg (Saale), Germ.,
deziras korespondi per leteroj kaj il. pk. kun ĉiuj landoj. [1]

S-o Walter Thieme, Poststr. 6, 5, Merseburg (Saale), Germ.,
deziras korespondadi per leteroj kaj il. pk. kun ĉiuj landoj.
Ankaŭ interŝanĝas pm. Respondas ĉiam. [1]

S-o Heinz Ewers, Regierung Abtlg. Schupo, Merseburg
(Saale), Germ., deziras korespondadi per il. pk. kun
ĉiuj landoj. [1]

F-lino Ružena Novotná, poŝta oficistino, Beroun v. C.,
Ĉeĥoslovakio, deziras korespondadi per il. pk. [1]

Por 1.—sv. fl. mi sendas serion da germanaj „Altershilfs-
marken“ (pm. por helpo al maljunuloj), stampitaj aŭ
nestampitaj, laŭ deziro E. Kind, del. U.E.A., Euskirchen,
Rheinlando, Germ. [1]

Filatelistoj! Kiu sendos al mi 100—300 pm. de sia lando
(escepte germanaj kaj aŭstraj), al tiu mi sendos la saman
kvanton ĉeĥoslovakajn. Samtempe mi deziras korespond-
adi kun la tuta mondo. Arpad Ronai, studento, Prešov,
Vajianskeho 15, Ĉeĥoslovakio. [1]

S-o Alfred Liebig, Oberstegensdorf, Bahnhoff, Silezio, Ger-
manujo serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Ĉiam re-
spondos. [2]

Du anglaj fraŭloj, C. James, 28 Lorrimore Rd., London S. E.
17, kaj I. Blake, 10 Ruislip Street, London S. W. 17,
deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj
(precipe inoj) per il. pk. kaj l. [1]